

NIA VOĈO
Madrída Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4^B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3^o-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

SEPTEMBRO-OKTOBRO 2002

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversaci-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3^o-7
Tel. 91 446 80 79

ION PLI PRI JULIO MANGADA (Tonyo del Barrio)

"Tras combatir en el Cuartel de la Montaña, Mangada pasa a operar en la provincia de Ávila, donde en una correría por la zona de Gredos, derrota a la columna del tristemente famoso Cte. Doval en Navalperal, volviendo luego a Madrid, en vez de perseguir a los derrotados. Al llegar a la capital, es tal la euforia por su victoria que se le concede la medalla de Oro de Madrid siendo aclamado por sus hombres como "general". Tio okazis komence de aŭgusto de 1936, ĉirkaŭ la 5a. Mi vidis en libro foton de la manifestacio kiu ricevis lin: tio estis en la Puerta del Sol kaj ĝi estis enorma.

Kiel ni informis en Nia Voĉo julio-aŭgusto 2002, HEF kaj Madrída Esperanto-Liceo oficiale skribis petante ke la Urbeŝtraro enmetu memor-tabulon, en unu el la domoj en kiuj li vivis (Fuencarral, 120 kaj Vallehermoso, 57), ambaŭ apartenas al kvartalo Chamberí.

ION PLI PRI EMILIO HERRERA (Tonyo del Barrio)

Li esperantiĝis en 1911 kaj ankoraŭ li uzis la lingvon en 1960.

NOVA PIV

Jam aperis nova eldono de Plena Ilustrita Vortaro. Kun 1265 paĝoj, 17.000 kapvortoj kaj ĉirkaŭ 47.000 leksikaj unuoj, ĝi estas la plej ampleksa vortaro de la internacia lingvo, nun reviziita kaj ĝisdatita. SAT eldonis tiun kolektivon verkon de ĉirkaŭ 150 kunlaborantoj. Madrída Esperanto Liceo faros komunan peton kun speciala prezo (antaŭ-pago necese, 62 eŭroj)

ESPERANTO EN AMASMEDIOJ

Radio Bronka, sendependa radio, per frekvenco modulita 99,00 elradias Esperantan programon organizitan de Barcelona Esperanto-Centro. La elsendo okazas lundon 19,20 h, mardon-merkredon 0,25 h, jaŭdon 10,11 h kaj dimanĉon 15,16 h.

Pli ol kvar paĝoj de la kataluna semajna gazeto "Catalunya Cristiana" estas dediĉitaj al Esperanto kaj ĝia historio.

MONDFEDERISTOJ VOĈDONIS POR ESPERANTO

La 24-a Monda Kongreso de la Mondfederista Movado (World Federalist Movement [WFM]), kiu kunsidis en Londono, Britujo, de la 11-a ĝis la 15-a de julio 2002, akceptis la ĉi-sekvan rezolucion pri Esperanto:

KONSIDERANTE KE demokrata monda federacio postulas la interŝanĝon de ideoj inter ĉiuj en la monda komunumo,

KONSIDERANTE KE la Esperanto-movado subtenas la mondfederistajn idealojn de mondĉivitaneco kaj egalaj rajtoj por ĉiuj membroj de la monda komunumo,

KONSIDERANTE KE ĉi tiu organizaĵo en la jaro 1977 alprenis rezolucion, kiu indikas ke mondfederistoj devus uzi Esperanton,

KONSIDERANTE KE la Mondfederista Movado estas membro de la Koalicio por Internacia Help-lingvo,

Ni rezolucias ke la Mondfederista Movado kuraĝigu siajn membrojn lerni la nenacian lingvon Esperanton.

Ni gratulas al BARCELONA ESPERANTO-CENTRO kiu festis en julio sian 25an datrevenon.
Gi ricevis oficialan permeson por ekagi la 13an de julio de 1977.

NIA VOĈO

SEPTEMBRO-OKTOBRO 2002

KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

Augusto Casquero partoprenis en la 12^a ĜENERALA KONFERENCO de MONDA TURISMO kiu okazis en Bydgoszcz (Pollando). Li estis elektita Vicprezidanto de Monda Turismo.

HEF-KONGRESO (raportas Pedro Garrote) Kiel atendite la HEF-kongreso ne altiris la atenton de multaj E-istoj. Nur grupo da amikoj-konatoj ĉestis por somerumi en Alikanto kaj klaĉi iomete en la internacia ligvo. Sed tamen 3 interesaj programeroj donis kvaliton al la ariĝo. La du prelegoj de la ĉino Sro. Pen, kiu parolis pri la ĉina lingvo kaj montris videobendon pri lia klubo E-ista en Ĉinio. La aliaj du programeroj estis ĉefrolulitaj de Adúriz. Li parolis pri la prononcado, kaj li emfazis la problemojn de la hispanoj por bone paroli. Li prezentis novan poŝvortaron sed ne la jam konata de ĉiuj "Amika", ne; li prezentis alian "2002" kaj promesis plibonigi ĉi tiujn kaj eble post kelkaj jaroj ni havos, la tiel longe esperatan, "Amika". Ankaŭ Tonyo del Barrio, tre laborema kaj agema, eble li serĉas ion, atentu ke post 3 jaroj ni bezonos novan prezidanton, donis bonan prelegon pri elstara E-isto de antaŭ la hispana intercivitana milito: Emilio Herrera. Augusto, kiel preskaŭ ĉiam, surprizis nin dirante ke li pretas organizi, denove, la UK-on en Valencio. Laŭ li Valencio estas nova urbo kaj la urbestro estas aperta por tiaj eventoj. Ni ĉiuj devas apogi lin, almenaŭ kore kaj mense.

SAT KONGRESO (Raportas Tonyo del Barrio) Inter la 1a kaj la 7a de julio okazis en Alakanto la 75a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), organizata de lokaj samideanoj. Aliĝis iom pli ol 200 personoj. Pro rifuzo de vizo, ĉirkaŭ 60 ne povis eniri en Hispanion. Ĉirkaŭ 30 estis hispanianoj. Pli multas francoj. Venis SAT-anoj el ekzemple Aŭstralio, Japanio, Madagaskaro, Irano, pluraj orienteŭropaj landoj, sed, iom kurioze, ne el Ameriko. La meza aĝo estis relative alta, kvankam ankaŭ partoprenis multaj mezaĝuloj kaj pluraj pli junaj. Okazis multaj kunvenoj, ja SAT estas tre serioza organizo. Ĉefe ili temis pri organizaj kaj politikaj temoj. Okazis kelkaj kunvenoj de la liberecana frakcio, en kiu aktive partoprenas pluraj samideanoj el Hispanio. Ankaŭ reekviglis la komunista frakcio. Grupo da hispanaj partoprenantoj kunvenis por analizi la nunan situacion de la laborista Esperanto-movado en Hispanio, kaj specife de la asocio HALE. Ne mankis kulturaj prelegoj: pri familio Zamenhof, pri Dalí, pri Eroshenko, pri García Lorca, pri lingvoj en Hispanio, tiuj ĉi du lastaj fare respektive de Miguel Fernández kaj de Augusto Casquero. Ankaŭ estis teatraj prezentadoj. Plej grava ero estis la prezento, fare de Michel Duc Goninaz de la nova versio de Plena Ilustrita Vortaro, kiun SAT eldonis. Vendiĝis granda kvanto da ekzempleroj. Ankaŭ estis distraj aktivaĵoj, inklude de ekskursoj tra la urbo Alakanto kaj al aliaj interesaĵoj en la provinco. Ni havis tempon eĉ por improvizita "Sankta Ferminaĵo". Mi profitas la okazon por gratuli nian samideanon Marteno Bustín, kiu, kun lia kunulino Lija, portis preskaŭ tutan la laboron organizi la kongreson.

.....

ESPERANTO LICEO DE MADRID

San Alejandro 6-4^oB. Ext

28005 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal